

Jean de La Fontaine, La Cigale et la Fourmi	Jean de La Fon- taine, La cikad' kaj la formik' <i>tradukita de Man- fredo Ratislavo</i>	Jean de La Fontaine, The Cricket and the Ant <i>tradukita de Donald P. Webb</i>	Jean de La Fon- taine, Cikado kaj formiko <i>tradukita de Anto- ni Grabowski</i>
...

La cigale, ayant chanté Tout l'été, Se trouva fort dépourvue Quand la bise fut ve- nue. Pas un seul petit mor- ceau De mouche ou de ver- misseau Elle alla crier famine Chez la fourmi sa voi- sine, La priant de lui prêter Quelque grain pour subsister Jusqu'à la saison nou- velle «Je vous paierai, lui dit-elle, Avant l'ôût, foi d'animal, Intérêt et principal .» La fourmi n'est pas prêteuse ; C'est là son moindre défaut «Que faisiez-vous au temps chaud? Dit-elle à cette em- prunteuse. Nuit et jour à tout venant Je chantais, ne vous déplaise. - Vous chantiez? j'en suis fort aise. Eh bien : dansez main- tenant.»	Sonis dum somer' kantad' De cikad'. Kiam venis la jar- fin' Sen proviz' ĝi tro- vis sin; Ĉar ne estis ie de Muŝ' aŭ verm' pe- cet', pro ve' Kaj malsat' ĝi tur- nis sin Al Formik', la naj- barin', Ŝin petante pri pa- ner'; Ĉar grandegis la mizer'. "Ĝis la nova kant- sezon' Iĝos ja de mi re- don'," Ĵuris ĝi, "kaj pagos mi Interezon ĝis Ju- ni'!" La formiko, kiu ve- re Ne pruntodonon ŝatis tre, Diris: "Mi ĝin do- nos ne! Kion faris vi some- re?" - "La pasantojn per muzik' Mi ĝojigis ĝis aŭtun'." "Mi tre ĝojas, dan- cu nun!" Diris tiam la for- mik'.	The cricket had sung her song all summer long but found her victuals too few when the north wind blew. Nowhere could she espy a single morsel of worm or fly. Her neighbor, the ant, might, she thought, help her in her plight, and she begged her for a little grain till summer would come back again. "By next August I'll repay both Interest and principal; ani- mal's oath." Now, the ant may have a fault or two But lending is not something she will do. She asked what the cricket did in summer. "By night and day, to any co- mer I sang whenever I had the chance." "You sang, did you? That's nice. Now dance."	Kantis dum somer' sen fin' Cikadin'. Kiam frosta vento blovis Sen provizo ŝin ek- trovis, Sen malgranda eĉ pecet' Da muŝeto aŭ ver- met'; La malsato pelis ŝin Al najbara formi- kin'. Kaj ŝi petis kun in- sisto: "Donu grajnojn por ekzisto Ĝis la nova jar- sezon'. Mi vin pagos, laŭ ordon', En Aŭgust', pro best-honor', La procenton kun valor'." Ke ne pekas formi- kino Per prunteemo, estas vere; "Kion faris vi so- mere?" Diris ŝi al pruntuli- no. - "Tage, nokte al venantoj, Ne mallaŭdu - kantis mi." - "Kantis? - gaja jen meti'! Nun ekdancu post la kantoj!"
--	--	--	--

...

...

...

...

Verkinto de tiu ĉi Franca poemo estas JEAN DE LA FONTAINE (*1621-07.08 - †1695-04.12).

Arg-549-1103 (2010-08-07 13:53:59)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tekston el <http://www.lafontaine.net/lesFables/afficheFable.php?id=1>.

Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de JEAN DE LA FONTAINE (*1621-07.08 - †1695-04.12) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983.

Arg-549-1105 (2010-07-09 23:08:07)

Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de JEAN DE LA FONTAINE (*1621-07.08 - †1695-04.12) en la Anglan de DONALD P. WEBB (*1939).

Arg-549-1111 (2010-08-06 19:10:14)

Mi, Manfred Retzlaff, transprenis tiun ĉi tradukon el la retejo <http://www.bewilderingstories.com/issue209/cigale.html>. La tradukinto, s-ro Don Webb, permesis tion mi. - I, Manfred Retzlaff, found this translation in the website <http://www.bewilderingstories.com/issue209/cigale.html>. The author, Mr. Don Webb, gave me the permission.

Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de JEAN DE LA FONTAINE (*1621-07.08 - †1695-04.12) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 - †1921-07-04).

Arg-549-1108 (2014-03-16 17:39:47)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi tradukon en http://www.babelmatrix.org/works/frLa_Fontaine,_Jean_de/La_cigale_et_la_fourmi/eo/5026-Cikado_kaj_formiko. Ĝi troviĝas ankaŭ en la retejo de la usona esperantisto Don Harlow <http://donh.best.vuh.net>. Pri la tradukinto vidu la vikipedion retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski. Vidu ankaŭ: http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado_kaj_formiko.